

Kulturaj Kajeroj

E. MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoi

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1981 - 2

KULTURAJ KAJEROJ

1981 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Akvo-vojoj en ekonomia Anĵu-vivo dum foraj tempoj B. Cheverry

Neniam estas utile tro rapidi... J. Manceau

Kiam dubas esperantisto H. Kristos

Artefaritaj paradizoj... ankaŭ por bestoj S. Guillot

La kaprino de S-ro Seguin trad. A. Ribot

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Ŝajnas, ke multaj legantoj de la revuo kaj eĉ vizitantoj de la Esperanto-Domo ne konas la statutojn de la Koopera Societo kiu estas posedanto de la bieno Gresillon. Ni ĉisube donas la tradukon de la ĉefaj artikoloj.

A-1 Estas fondita Koopera Societo kun variigebla kapitalo, laŭ la leĝoj de 24-7-1877 kaj 7-5-1917, sub la nomo « Kultura Domo de la Franclandaj Esperantistoj ».

A-2 La Societo havas edukan kaj distran karakteron. Neŭtraleco religia kaj politika regas dum la kunvenoj. La celo de la Societo estas la aĉeto de Konstruaĵoj, terenoj, materialoj, kiuj ebligas la esperantistan formadon kaj la socian kaj intelektan emancipadon de la membroj. Per disponigo de nutrado kaj loĝado ĝi devas doni al ili la eblecon :

a) ĉeesti esperantistajn « somerajn lernejojn », internaciajn renkontojn, kongresojn, ktp...

b) kune studi la problemon de la intruado kaj de la propagando de Esperanto,

c) instigi al la organizado en la Esperanto-Domo de prelegoj, kaj de praktikaj, edukaj, artaj, teknikaj faradoj por riĉigi la konojn de la partoprenantoj ;

d) organizi distraĵojn por la membraro per amikaj kunvenoj kaj artaj aranĝoj ;

e) faciligi por la membroj la praktikadon de sportoj.

A-3 La minimuma kapitalo de la Societo estas 6 000 frankojn. Ĝi estas dividita en 60 partojn de po 100 frankoj. Ĝi povas ampleksiĝi per aĉeto de partoj fare de membroj aŭ per novaj membriĝoj. La societa parto, kiu permesas fariĝi membro de la Societo estas 100 frankan. Ĝi donas neniun profiton.

A-4 La kapitalo-partoj ne povas esti venditaj aŭ transdonitaj sen la permeso de la Konsilio.

A-6 Se iu membro malaperas, kia ajn estas la kaŭzo, tiu membro aŭ liaj reprezentantoj rajtas ricevi repagon de la sumo korespondanta al la aĉetitaj kapitalo-partoj.

A-7 La Societo havas la rajton farî tiun repagon nur post kvin jaroj.

A-10 La Societo estas administrata de Konsilio de 12 membroj elektitaj per baloto de la Ĝenerala Asembleo. Tiu Konsilio estas elektita por 4 jaroj sed duone ŝanĝita ĉiun duan jaron.

A-12 La Konsilio kunvenas almenaŭ unu fojon en ĉiu trimestro. Ĝi havas tre larĝan kompetentecon koncerne la administradon de la Societo. Ĝi respondas pri siaj decidoj antaŭ la Ĝenerala Asembleo.

Ni esperas, ke tiuj informoj permesos al ĉiuj pli bone koni la strukturon kaj funkciadon de la Koopera Societo. Ni substrekas la fakton, ke la kapitalo ne estas limigita kaj ke, konsekvence la Kooperativo akceptas ĉiam, iam ajn, novajn membrojn. Ni aldonos, ke ĉiuj administrantoj aŭ responduloj de stud-periodo estas nesalajritaj bonvolemaj samideanoj.

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso de Brazilio :

— La temo de la kongreso, « kulturoj kaj lingvoj : pontoj kaj baroj » estos traktita el tri vidpunktoj : sociologia, nacikultura kaj ĝenerala.

Prelegos, interalie, Baldur Ragnarsson, Humprey Tonkin, kaj Sylla Chaves.

— La Internacia Kongresa Universitato prezentos 13 prelegojn ; la prelegantoj venos el 11 landoj.

— La speciala prikongresa poŝtmarko estos « lanĉita » dum vespera « ceremonio », la 25 an de Julio.

— Oni antaŭvidas solenan inaŭguron « nefermitan », por akcepti, krom la kongresanojn, interesitojn el la ĝenerala publiko.

Ĉina bilanco :

En 1980, la ĉina esperanto-movado havis grandan disvolviĝon. Kursoj funkciis en 40 urboj, en kiuj lernis pli ol dekmil personoj. Krome, pli ol dudek mil personoj lernas perkoresponde.

5 altaj lernejoj prenis Esperanton kiel nedevigan studobjekton, 10 altaj lernejo starigis kursojn.

Ĉiutage, Radio-Pekino disaŭdigas kvarfoje en la internacia lingvo por la diversaj kontinentoj.

Oni publikigis, komence de 1981, novan lernolibron kaj reeldonis vortaron Esperantan-Ĉinan.

Fine de lasta Januaro, okazis la inaŭgura kunveno de la loka asocio de Pekino. Pli ol 300 personoj ĉeestis Ĉinio estas nun la lando kie laboras plej multe da profesiaj esperantistoj.

En Mongolio :

Mongola Esperanto-Unuiĝo funkcias en la ĉefurbo Ulan-Bator, kun la helpo de la komitato de verkistoj. Oni antaŭvidas eldonajojn de lernolibro kaj de granda vortaro.

La Someraj Universitataj Kursoj :

La 5a sesio de tiuj kursoj okazos en la universitato de Lieĝo (Belgio), de la 5a ĝis la 19a de Julio 1981, kun du sekcioj : Ekologio kaj Pedagogio, sed ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas 12 aŭ 18 lecionoj (de Lundo ĝis Vendredo). Eblas partopreni unu aŭ plurajn kursojn eĉ en ambaŭ sekcioj. Ekzamenoj, kulturaj aranĝoj, perfektiga esperanto-kurso.

Peti informojn al : « Someraj Universitataj Kursoj », Boite postale 9, B-Liège X, Belgio.

Renovigo de bonaj rilatoj kun U.N.E.S.K.O. :

La 17an de Marto, la ĝenerala direktoro de U.N.E.S.K.O., S-ro Amadou Mahtar M'Bow akceptis, en Parizo, delegacion de kvar respondeculoj de U.E.A. kiu donacis al li ĉ.ujn aperintajn volumojn en la esperantlingva libro-kolekto « Oriento-Okcidento ».

La amika etoso de la unuhora renkontiĝo pruvis denove ke la internacia lingvo havas eminentan simpatianton en la persono de la ĝenerala direktoro.

Rekorda nombro de esperantistaj manifestacioj :

En 1981, la esperantistoj disponos pri pli ol 200 « programoj » de renkontoj, kongresoj, seminarioj, turistaj rondiradoj, ktp...

Ni jam anoncis kelkajn, ni tamen ankoraŭ volonte atentigas vin pri :

— « Feria semajno ĉe Mediteraneo » (15-20a de Septembro). Informoj : Esperanto, 5, rue du Docteur-Roux, 34000 Montpellier, Francio.

— « Esperanto-renkontiĝo » de la Esperanto-grupo de Instituto por moderna lernejo (Freinet-movado), en Vaison-la-Romaine (suda Francio), 16-26a de Julio. Informoj : P. Poisson, 239, rue V.-Hugo, Saint-Cyr-sur-Loire, 37100 Tours, Francio.

— Tri ĉ.aj kaj variaj programoj en Pollando. Petu informojn al : Buroo de esperanto-turismo « Esperantotur », str. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando.

— Naŭ hungaraj rendevuoj ! Informas : Hungara Esperanto-Asocio, Pf 153, H-1443 Budapest, Hungario.

— Feriado en Malto, 1 — 7a de Septembro. Skribi al Esperanto-Societo, « La Espero », New Street off Q-ormi Road, St Venera, Malto.

— « Aŭtobusa vojaĝo tra Eŭropo » : Esperanto-centro de Aarhus (Danlando) planas unumonatan vojaĝon tra ĉirkaŭ 15 landoj en Jul.o. Eblas partopreni la tutan vojaĝon aŭ nur parton de ĝi. Skribu al : Esperanto-Centro, Banegardgade 19, DK 8000 Aarhus, Danlando.

— Turka Esperantista Asocio proponas, en 1981, 16 vizitojn en Istambulo. Ĉiuj el la vizitoj komenciĝos jaŭde kaj finiĝos marde. Rabato por grupoj. Informas T.E.A., S-ro Hayrettin Dural, Saskinbakkal/Akin Sokaĝi 12/2 D-7, Suadiye/Istambul, Turkujo.

— Amikec-kongreso, 11 - 16a de Julio, en Bad-Münstereifel, en la Rejno-regiono. Skribu al S-ro Pierre Delaire, B.P. 2002, 45020 Orléans-Cedex, Francio.

Verki pri komputoriko :

Unuafoje, la Centro de Komuna Esploro pri Elsendado kaj Telekomunikado (Francio), sub aŭspicio de U.E.A., organizas perkorespondan kolokvon pri komputoriko. La kontribuantoj devos verki fakan artikolon, originale en Esperanto, 5 ĝis 20 paĝan, tajpitan en 2 ekzempleroj. Skribi al S-ro C. Bertin, C.C.E.T.T., B.P. 1266, F — 35013 Rennes — Cedex, Francio.

Inform-scienca fako :

Fondiĝis Internacia Grupo Informo-scienca. I.G.I. kunigas komputistan sekcion kaj la laborgrupon pri aŭtomata lingvo-prilaborado de Eŭropa Klubo. I.G.I., Pf 193, H — 1368, Budapest, Hungario.

Hilda Dresen forpasis :

Je la aĝo de 85 jaroj, mortis talenta esperanta poetino, Hilda Dresen. Ŝi vivis en Estonio kaj multe faris por konigi la literaturon de tiu malgranda, malbone konata lando. Ŝi ankaŭ, interalie, verkis originalan verkon (poemaron) : « Norda Naturo ».

Literatura evento :

Oni anoncas, por Oktobro 1981, la aperon de « Tutmonda Sonoro », de K. Kalocsay : 581 poemoj de 185 poetoj, tradukitaj el 30 lingvoj. Du binditaj volumoj sur 700 paĝoj.

Novaj libroj...

— « Ĉu li venis trakosme ? », nova polica romano de Johan Valano.

— « La faraono », laŭ la fama romano de la pola verkisto B. Prus.

— « Plena analiza gramatiko de Esperanto ». Reaperis tiu fama gramatika verko de Kalocsay kaj Waringhien (presita en Ĉinio). 599 paĝoj, bindita.

Kaj muziko...

— « Per mia nura vol' ». Kasedo kun dek feminismaj kantoj kantitaj de Suzana Kasteiviva kaj tradukitaj de Corsetti, kun tekstol.breto.

— « Serenado al fraŭlino Loli kaj kvar aliaj kantoj ». Kantas Veselin Damjanov.

AKVO- VOJOJ EN LA EKONOMIA ANĴU-VIVO, DUM FORAJ TEMPOJ

Kial speciale citi francan provincon ? Nedube, ĉie en la mondo, navigeblaj akvovojoj ludis — kelkaj ankoraŭ ludas — gravan rolon en landa ekonomio, ĉu ne ! Tute konsentite !

Hodiaŭ, tie-ĉi, ni volas nur redoni resumon de temo pritraktita lastan someron en la Esperantista kulturdomo Gresillon kiu, en Francio, situas, kiel oni scias, en la Anĵua « Loire » — valo (pr. Luar') : Unu el la temoj kiuj inter aliaj, plej diversaj, celas al pli bona konatiĝo de naj vizitantoj kune kun momenta restadejo.

Do, en Anĵu, kies river-reto estas aparte densa, de la plej fruaj aĝoj, ĉirkaŭ la Luar' kaj ties ĉefaj navigeblaj alfluoj strukturiĝis regiona ekonomia vivo, sekve regiono mem : dum jarcentoj, ĝis invento kaj uzado de fervojoj aŭtomobiloj, aviadiloj, eble pli ol la ter-vojoj, estis la akvo-vojoj, kiuj plej gravis en hominterkomunikadoj plej diverstipaj. Efektive, en la pasinteco, kiam la ter-vojoj ne ĉiam kontentige estis traveturebla j, foje malsekuraj kaŭze de rabistoj kiuj ne hezitis salti al la ĉeval-koloj kaj uzi armilojn por havigi al si deziratajn posedaĵojn (nenio nova sub la suno !) tiam, navigeblaj riveroj estis multe pli uzataj ol oni povas nun supozi, tio ne nur de najbaraj bordanoj por ĉiutagaj bezonoj kaj pere de simplaj boatoj sed multe pli grandskale de komercistoj ankaŭ de privilegiuloj : princoj kaj nobeloj, riĉaj burĝoj, kies cetere ŝipaj promenadoj neniam estis tute sencelaj. Kompreneble, ĉiu kategorio uzis ŝipojn pli speciale adaptitaj je la bezonoj... aŭ mon-eblecoj ! Despli interesa estis la spektaklo, senpage oferdonita de la river-, aparte de la Luar-navigado, al la kuriozemaj bordanoj.

Ne la plej elegantaj estis la imponaj river-kaleŝoj ĉefe kreitaj por transportado de pasaĝeroj sed kies supra arangxo ne permesis aldonon de fortaj mastoj kaj multnombraj veloj. Al ili profitis la akvofluo, kiam almaren irantaj kaj, revene, la okcidenta vento, la plej ofta en nia regiono. Laŭbezone, remistaro pli malpli ampleksa, ankaŭ funkciis sur tiuj vojaĝ-ŝipoj kaj okazis ke oni aldonis plian helpon de fortaj ĉevaloj kiuj el la riverbordo haŭlis la boaton. Estis la « kabanoj » kiuj surtere reprezentas simplajn dometojn konstruitajn el krudaj ne ĉiam fortikaj materialoj. Ankaŭ sur akvo, tiuj « kabanoj » estis simplaj pramoj sur kiuj oni fiksis lignan, komunan ejon, iom doma, alportanta relativan komforton al modestaj pasaĝeroj. Tamen, en la ĝenro, estis pli luksaj kiujn oni nomis « reĝaj kabanoj » ne nur ĉar iom pli komfortaj kaj belaspektaj interne kiel ekstere, ankaŭ ĉar sekvataj de unu aŭ pluraj simplaj « kabanoj » por la transportado de akompanantoj, servistaro, materialo. Estis (el malnova franca lingvo) la « pataches », tiuj-ĉi ne tre grandaj sed pli rapidaj kaj plej ofte uzataj de oficistoj el kiuj doganistoj. Tute malsimilaj estis la varŝipoj — kiuj — almenaŭ ĝis la eltrovo kaj uzo de la vaporforto — havis fortajn mastojn, velojn kaj laŭbezone remistojn : Fortikaj pramoj elpensitaj por specifaj vartransportadoj kaj negocado, tute ne por la komforto de la prizorgantoj ! Dum la favoraj monatoj — ne ĉiuj estas tiaj — laŭlonge de la tuta navigebla parto de Luar multegaj vel-ŝipoj, ĉu almaren, ĉu almonten irantaj, transportis varojn. Belegaj estis tiaj ŝipoj velveturantaj. En regiona dialekto oni nomis ilin « gabarres » kaj ties ŝipanoj « chalandoux » el la franca vorto « chaland » (pr. ŝalan'), tradukebla per « barĝo ».

La maro, pere de la Nantes-haveno alportis al niaj barkoj ekzotikajn produktaĵojn por disvastigado en la tuta lando pere de la tiamaj multnombraj river-havenoj. Inverse, tiuj-ĉi estis kolektantaj niajn provincajn produktaĵojn por ilin eksportadi al landen, eĉ ĝis tre malproksimaj alikontinentaj insuloj. Inter la Anĵuaj, la plej kutimaj estis vinoj, mason-ŝtonoj (la blanka tofo), ardezoj, cerealoj, kies volumeno, pezo, allogeco al malproksima klientaro pli ol aliaj trovis avantaĝojn en ŝip-transportado. Ni ne miru se unue vino estas citata, sen forgesi ĝiajn derivaĵojn : brando, alkoolo, vinagro. Ja, la fakto ke niaj Anĵuaj riveroj plej ofte fluas ĉe piedoj de montetoj portantaj vitejoj multege faciligis, en la pasinteco, la per-ŝipan komercadon, kiam aliparte niaj vinoj, ĉefe la blankaj, estis alte taksitaj ne nur en Francio, ankaŭ en Anglujo, en Flandrio kaj Nederlando. Kaj se ni rigardas al malnovaj arkivoj rilatantaj al privilegioj, al transport-impostoj ĉe transiradoj de pontoj, urboj, feŭdaj bienoj, oni povas konscii kiom amase la perakva vintransportado, praktike nekaŝebla, povis nutri la kasojn de potencaj river-bordanoj ! La tiel nomitaj « vinoj por la maro » reprezentis la plej valorajn vin-originojn, do, ĉefe destinataj al eksportado kaj riĉa klientaro kiam pli ordinarajn oni nomis « vinoj por Parizo », ili ankaŭ transportitaj sur akvoj de Luar kaj sur kanalo al Sejno ĝis la franca ĉefurbo. La plej maldoĉaj, ĉiam perŝipe iris al Orleano, kie multaj establoj transformis ilin en vinagron : Ni sciu ke en la pasinteco vinagron oni multe uzis en niaj regionoj ne nur kiel kondimenton en la ĉiutaga nutrado, ankaŭ en medicinaj pocioj kaj en plej diversaj aliaj uzoj. Alia Luarurbo, Saumur ('Somu), de la komenco de la 17-a jarcento, iĝis impona komerco-centro pri brandoj eltiritaj el vinoj rikoltitaj sur ties ĉirkaŭantaj montetoj.

Plia Anĵua-perŝipa eksportaĵo : La tofo aŭ kalka ŝtono. Ja, en orienta parto de la provinco, larĝa kreta zono superas de siaj altaĵoj la maldekstran bordon de Luar kaj tieaj riveralfluoj. El tiu relative mola krutaĵo tre frue la homoj sciis eltiri belajn, blankajn ŝtonojn por konstrui domojn, kastelojn, religiajn monumentojn. La nekalkulebla kvanto da eltiritaj ŝtonoj certe mirigus nin, ĉiam en antikvaj raportoj konsideratajn kiel regiona riĉaĵo. Ĉiam, kiam eblis, la elirejo el la ŝtonminejoj estis proksima al la rivero por faciligi la enŝipiĝon ĉe river-havenoj kaj de tie iri al plej proksimaj de la plantaj konstruaĵoj, aŭ al la mar-haveno Nantes por, de tie, sur mar-ŝipoj iri ĝis Ameriko, ĝis Antiloj kaj iamaj francaj kolonioj el kiuj Sankta Dominiko. Se tiuj malproksimaj landoj alte taksis la blankajn ŝtonojn ankaŭ ili postulis de Anĵu la sendadon de kalko speciale transformita por firme kunligi inter si la konstru-ŝtonojn : Ĉiam tre proksime de rivero, aparte en « Chalonnes » (Ĉalon'), borde de Luare, gigantaj enrokaj fornoj dumlonge cendrigis la necesan mineralon por ricevi konvenan kalko-polvon liverotan al diversloka klientaro.

Alia tipa Anĵua produktaĵo : Ardezo. Kiel tofo, tre frue la lokaj ardez-rokoj estis rekonataj de niaj praavoj kiel bonega konstru-materialo. La Romianoj dum okupado de nia regiono uzis ilin por starigi la pilierojn de la unuaj masonitaj pontoj kaj nia loka historio raportas pri mirakloj de sanktulo Lezin (daŭre patrono de la ardez-laborista kunfrataroj) kiu la unua konsciis pri la fende-

bleco de la ardez-blokoj kaj havis la ideon uzi ilin kiel tegment-kovrilojn. De la 12-a jarcento, sub influo de la « Plantagenêts » kiuj kreis multe da monaĥejoj, hospitaloj, kasteloj, la loka ardez-baseno nutris imponan industrion kiu eksportadis samloken kiel tofo. Oni asertas, ke en la 1666-a, sekve de la tiama Londona incendio kiu detruis grandparte la urbon, granda kvanto de Anĵuaj ardezoj kontribuis al renovigado de la ĉefurbo.

Ni alvenas al malpli pezaj varoj, tiuj-ĉi bazaj homnutraĵoj : la cerealoj el kiuj tritiko, en la pasinteco sufiĉe grandskale kultivita en nia provinco, milio, maizo, hordeo, aveno. La Anĵuaj barkoj plue kunportadis ruĝajn kaj blankajn pizojn, fabojn, lentojn. Tiuj-ĉi sekaj legomoj ĉe alveno en la Nantes-haveno estis transportitaj sur marŝipoj, ĉu por eksportadoj, ĉu por esti uzataj kiel baza nutrado de ŝipistoj.

Ankaŭ dissenditaj estis migdaloj, nuksoj, ĉe ni tre abundaj en la pasinteco kaj iu speco de nigraj prunoj, seke kuiritaj por postaj desertoj, kiam alia speco estis destinita al tinkturistoj, oleoj el nuksoj, ankaŭ el kanabgrenoj : ja, sur la humidaj bordoj de la dekstra bordo de Luar oni kultivis multe da kanabo, kies tekseblaj fibroj ankaŭ konsistigis eksporteblajn varojn, ĉu krudajn ĉu transformitajn en fortaj tolaĵoj aparte konvenaj por transformado en vel-ŝipoj, kamparaj protektiloj, ktp. Pomfruktoj abunde iris al la nacia ĉef-urbo ĉar tre ŝatataj de la Parizanoj. Al tiuj varoj esence kamparaj, oni aldonis kelkajn enurbajn fabrikaĵojn, kiel ia famaj rozarioj el Saumur, ladaĵojn, mercerojn, ktp.

Ĉu malplenaj revenis la boatoj ? Tute ne ! Neniam komercistaj leĝoj povus tion toleri, kaj decis doni laboron al la revenantaj ŝipistaroj. Aliparte, nia provinco bezonis ricevi kion ĝi mem ne produktis. En la kargoj transportitaj sur Luar estis la salo kies komercado, antaŭ la revolucia epoko naskis tiom da rakontoj redonataj de generacio al generacio. Ja, sub reĝa povo, la salo, tiu nepra viv-necesaĵo, donaco de la naturo, estis submetita al tre alta imposto : Imposto tiel nepopulara ke ĝia nuligo estis inter la plej akraj postuloj de la revolucianoj en 1789. Niaj Anĵuaj praavoj havis duoblan okazon por grumbli : En najbara provinco, nature sal- produktanta ĉar borde de maro, kiel Bretonio, la interna komercado estis ankoraŭ pli alta ol en malproksimaj, la sal-reglementado pli severa, kio enkondukis multe pli da kontrabandistoj, multe pli da doganistoj... kaj da bataloj inter la du partioj ! Plej ĝenerale, la kontrabando okazis nokte kaj pere de padetoj aŭ ter-vojetoj, meze de izolitaj kamparoj.

Ne tiel kaŝeme oni povis uzi river-transportadon. Sed, la ŝtat-instancoj mem por plej rekte enkasigi la sal-impoŝton estis krentaj specialajn barkojn je sola uzo pri salo, kun ŝipanaro konsistanta el ŝtat-deĵorantoj inter kiuj doganistoj. Multnombraj, laŭlonge de Loire, estis tiaj barkoj, kiuj de la maro ĝis la Centra montaro distribuis manĝovaron tiel necesan al homoj, riĉaj aŭ ne. Revene, en la unuaj jarcentoj, sed ĉefe je la 17-a jarcento, la barkoj kunportis el la Nevers-regiono tutan vazaron el fajenco bele dekoraciita.

Kion pli, ŝipoj el mar-havenoj venantaj, povis distribui en river-havenoj laŭlonge de almontiranta vojo ? Inter aliaj, ĉiujn ekzotikajn varojn el malproksimaj kontinentoj : Kafo, indigo, spicaĵoj, sukerkano. Tiu-ĉi, kiel salo, ĉe transpaso de provinco al alia estis submetita al tre alta imposto, tamen ne tiel nepopulara, ĉar modestuloj trovis surloke aliajn rimedojn el kiuj la abel-mielon.

Ve ! Luar-ŝiparo kaj la transit-haveno Nantes, ĉefe dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj, konis alian komercadon kiu multe riĉigis la negoc-specialistojn. Ni ne kuraĝas paroli pri « varoj », kvankam la tiamaj instancoj, leĝe, permesis la sklavo-komercadon, verŝajne pro profitoj eltirotaj de riĉa klientaro, nobela aŭ freŝdate burĝa, tre altirata de nova modo pri ĉio ekzotika : spicoj kaj fruktoj, floroj kaj arbetoj, bestoj kiel ekzemple simioj kaj papagoj, ankaŭ pri ekzotikaj geservistoj, kiujn okaze de pompaj invitokunvenoj ili vestis ne malpli pompe.

Mi ege bedaŭras tiel « nigrigi », duoblasence, la riverŝipadon en nia regiono.

Kompense, mi devas aldoni ke ne ĉiam ĝi estis facila kaj senriska por la ŝipistoj kiel pri la transportataj varoj. Laŭ la sezonoj kaj vetero, la Luar kaj ties alfluoj povas esti tre kapricaj ! Krom fulmotondroj, tempestoj, kiuj subite povas ampleksigi la akvo-impeton, printempaj inundoj, kaj glaci-rompaĵoj elmontare venantaj, someraj sekecoj kiuj malakvigas la riveregon ĝis nudigi ampleksajn sablo-benkojn, aŭ rokojn, ŝip-ruinajojn aŭ maloportunajn eljetaĵojn, ankaŭ obstakloj de homoj mem kreitaj, alibezone, povis multe ĝeni, eĉ endanĝerigi la river-navigadon. La nombro de la registritaj ŝip-pereoj kun homdronadoj en Luar estas multe pli granda ol oni povas supozi, despli ke la tiamaj zorgoj al saveblaj dronantoj estis plej empiriaj kaj tute ne efikaj. Nur fine de la 18-a jarcento estis instalitaj laŭlonge de Luar kaj « Maine » (pr. Men') sekurkestoj entenantaj plej urĝajn rimedojn. Sed, bravaj estis niaj ŝipistoj, bone konscientaj pri sia profesia utileco en la ekonomia vivo de la regiono. Por ili, malsimileco de la labor-kaj viv-kondiĉoj, tute normale, enkondukis malsimilecojn en la viv-manieroj meze de samvilaĝaj ter-kultivantoj, laboristoj aŭ komercistoj. Pli ol la aliaj, ili estis vivoplenaj kaj lertaj.

Eĉ de malproksime ilia silueto prezentis diferencon ankoraŭ akcentita de la kostumo. Surtere kiel surakve, ili kutimis surmeti bluzon sufiĉe mallongan por ne ĝeni la manovron de ŝip-kabloj, remiloj, varoj, fortan pantalonon, kaskedon special-forman, ruĝan aŭ brilkoloran fulardon ĉe la kolo, ruĝan flanel-zonon ĉe la talio. Multaj havis orelringon markitan de ankro. Surgrunde, ili ne havis anĝelan reputacion.

Laŭdire ili ŝatis trinki, eĉ drinki, tamen tre sperte rilate la elekton de la vinoriginoj ! Ili emis flirti kaj amori, kompense al longaj kunestadoj nur viraj. Ĝenerale, ili havis fortan voĉsonadon en konversacioj emajlitaj de multaj specifaj sakraĵoj. Sed, ĉar ĉiam pretaj sin helpi reciproke, surtere kiel surŝipe, ilia korporacio, inter la unuaj, kreis mutualajn societojn.

Mi ne volas fini ne dirante, ke se perakva transportado multe faciligis la var-komercadon, ankaŭ ĝi multe utilis al vojaĝantoj. Kompreneble, mi tute ne volas aludi al plej terurigantaj invadantoj, de malproksime, ofte permare, venantaj, kiuj en la pasinteco multe rabis, predis, detruis, kelkfoje instaliĝis. Pli simple, mi volas aludi al pacemaj homoj altirataj, foje de tre malproksime, al famkonataj foiroj, festoj, pilgrimoj por kiuj vojaĝ-partoj pere de boatoj estis pli ripozemaj kaj sekurecaj ankaŭ ne tre multkostaj. Sed, ne nur tiaj vojaĝantoj trovis utilecon en river-navigado : Ni devas konscii ke dum tre longe ne estis Luar-pontoj inter Angers-Les Ponts-de-Cé kaj Saumur, 46 kilometrojn distancaj unu de la alia kaj kvankam la riverbordoj estis sufiĉe dense enloĝataj. Sekve, ankaŭ okaze de regionaj eventoj, de edziĝ- aŭ funebr-ceremonioj ĉe unu aŭ alia riverbordo ne estis alia rimedo, ol uzo de barkoj aŭ pramoj, tiuj fortaj, grandaj platboatoj kapablaj transporti ne nur homojn, ankaŭ veturilojn kaj bestojn de unu bordo de rivero ĝis la alia. Ĝenerale unu sola viro funkciigis tiajn boatojn. Oni nomis lin pramisto, ne ŝipisto, kaj fakte, li restis pli kamparulo ol vojaĝanto. Kelkaj, ege malmultaj, restas funkcientaj sed, al ni, Anĵuanoj, restas memoraĵoj pri kelkaj el ili, kiuj dum la lasta mondmilito, plej ofte dumnokte, ne hezitis transporti rifuĝantojn de norda regiono al la suda.

B. CHEVERRY.

NENIAM ESTAS UTILE TRO RAPIDI...

Sub tiu titolo aperis en N° 6/1980 de KULTURAJ KAJEROJ rakonton de Frenc Mora, tradukitan de Dro I. Nagy. La rakonto estas interesa kaj sprita, ĝia sola manko estas ke la aŭtoro, verŝajne tute sincere, prezentas ĝin kiel historiaĵon, dum simpla esploro montras ke ĝi multfacete estas fantaziaĵo : la aŭtoro mem ne sekvis sian propran konsilon.

Resume, la rakonto tekstas ke, dum la regado de Ludoviko XVa en Franclando, iu BOURET, en dormoĉambro de Liona gastejo, hazarde aŭdis komploton, kiel se iu DAMIENS, estus signita por murdi la reĝon kaj savi Francujon kontraŭ la malbona influo de Madame du BERRY, kontraŭ kiu disfloris multaj spitkantoj. Li raportis al la tiama policministro, S-ro BERRYER, kiu tion tutsimple ne kredis kaj ordonis elĵeti lin. La morgaŭan tagon, DAMIENS pikis la reĝon per ponardo, kaj BERRYER, por kovri sian kulpon, kaptigis BOURET kaj metis lin en BASTILLE-malliberejon, kie li restis ĝis la 14a de julio 1789a kaj la Granda Revolucio kiu faligis ĝin. Laŭ F. MORA, la rakonton oni ĉerpis el memuaroj de MALESHERBES, kiu havis la penson BOURET estis la sola homo kiu priploris la detruon de Bastille pro tio ke poste li ne sciis kie loĝi.

Ni unue listigu historie kontrolitajn faktojn, kiuj ne kongruas kun tiu rakonto. Tio ne taksas Malezerbon (Malesherbes) mensoganto, sed ties diritajn memuarojn kiel apokrifajn. En tiu tempo, ili tre abundis. Cetere, li ne havus multan tempon por skribi memuarojn post 1789a, ĉar post la morto de Ludoviko XVa en majo 1774a, li estis plurfoje ministro de Ludoviko XVIa, ĝis 1792a, kaj post la definitiva falo de Ludoviko XVIa, li estis ties advokato antaŭ la revolucia tribunalo kiu kondamnis la eksreĝon al morto je unu voĉo de plimulto, en 1794a, sed post tio, samjare, li esti mem senkapigita, kio montras la akcelon de la revolucio radikalismo. Jen la listo.

— 1) Madame du BERRY : nur por la ne-francoj estas bezonata diri ke certe kulpas preseraro kaj ke la ĝusta nomo devus estis, se homononimeco, Madame du Barry, kvankam estas amuze rimarki ke en la sama epoko malbonfamis iu dukino du Berry, filino de la regento filipo de Orleano. Ŝi havis dibočan vivon, sed vivis de 1695a ĝis 1719a, kio ne kongruas kun la atenco de DAMIENS kiu okazis post ŝia morto.

— 2) DAMIENS Robert Franĉois (1715-1757) atencis kontraŭ la vivo de la reĝo Ludoviko XVa la 5an de januaro 1757a. Lia konduto estis priesplorita kun helpo de teruraj turmentegoj, kio montris, nedubinde, ke li ne havis kunkulpintojn. Li estis ekzekutita la 28an de marto 1757a.

— 3) Jeanne BECU VAUDERNIER, grafino DU BERRY (1743-1793) renkontis la reĝon Ludoviko XVa unuafoje dum la jaro 1768a. Tiun jaron mortis la reĝino Maria LECZINSKA jam 65-jaraĝa. Ĉe la atenco de DAMIENS, Madame du BERRY estis do nur 14-jara kaj ankoraŭ tute ne pensis pri la reĝolito ; Sed fakte, Nicolas, René BERREYER estis policestro en 1757a jam de 1747a kaj fariĝis flotministro nur en la jaro 1758a.

— 4) Jeanne Antoinette POISSON, Le NORMAND D'ETIOLES, markizino de POMPADOUR (1721-1764) renkontis la reĝon unuafoje en 1741a : la atenco de DAMIENS okazis do dum la tempo kiam ŝi estis favoritino de Ludoviko XVa.

— 5) BOURET. Oni tute bone scias kiuj malliberuloj estis liberigitaj la 14an de julio 1789a. Laŭ FUNK BRENTANO, ili estis entute 7 ; kaj nome 4 friponoj kiuj falsis kambiojn : BECHADE, LAROCHE, LA CORREGE, PUJADE ; unu abomena krimulo tie enfermita kaj gardita pro kompato al lia familio, kiu cetere pagis por lia « gastado » : la grafo de SOLAGE ; kaj 2 frenezuloj : TAVERNIER kaj DE WHYTTE kies gastadon pagis ties familioj. Estis do en tiu malliberejo neniu BOURET.

Verŝajne, do, la citado de la policestro BERRYER, de la atencinto DAMIENS, de la tiama reĝo LUDOVIKO XVa kun aludo al la spitkanzonoj estas la solaj verajoj de la rakonto. Tiuj spitkanzonoj estis speciale akraj ĉar la favoritinoj ne estis nobelinoj sed burĝinoj, kaj la grandsinjoroj timis perdi sian influon al la ŝtatpovo. Ni citu nur kvazaŭ pruvo tiun riveligan eltiron kontraŭ Madame de Pompadour : « Tandis que Louis dort dans le sein de la honte, et d'UNE FEMME OBSCURE INDIGNEMENT EPRIS... » « Dum Ludoviko dormas en la hontosino, kaj de senranga virino sendigne enamiĝinta... ». Tiu kanzono estis eble de MAUREPAS, reĝa ministro, inteligenta, sprita, sed terure envia kontraŭ kiu ajn alia povante havi influon al la reĝo. Tiuj kontraŭ Madame du BARRY ne estis pli dolĉaj, sed kiel ni vidos pli poste originis de CHOISEUL ĉefe.

Tiaj eraroj de MORA estas tre pardoneblaj, ĉar faritaj de hungaro pri landhistorio al li fremda, kaj estus tute sensignife reĝustigi la priskribitajn faktojn se, en Francujo mem, oni ne propagandus samspecajn erarojn pri LUDOVIKO XVa. Ekzemple, mi legas en oficiala resuma libro de miatempa elementa lernejo, verkita de J.B. CUVILLIER, la jenon :

« La regado de LUDOVIKO XVa estas unu el la plej bedaŭrinda de nia historio. Li perdis nian koloniaron, li pliigis la mizeron de la popolo per la « MALSATIGA KONTRAKTO » de 1770 (pacte de famine). Li lasis la reĝecon pli kaj pli abomenata ».

« Le pacte de famine »

Oni nun scias ke tiel nomita per asonanco kun « le pacte de Famille » neniam ekzistis kaj estas nur kalumnia elpensaĵo. Jen kiel naskiĝis la ideo. La ekonomika doktrino de la regno estis esence liberala : « lasu fari, lasu cirkuli ». Por tamen sekurigi la provizadon de grandaj urboj kaj de regionoj, oni amasigis rezervojn en grenejoj, kio kredigis al kelkaj ke la celo estus plialtigado de la grenprezo. Kontraŭe, ĝuste en 1770a, pro kaj post malbona rikolta, abato TERRAY malpermesis eksporton de tritiko : la panprezo malaltiĝis kaj en 1774a, oni revenis al la libereco de cirkulado. Nenia MALSATIGA KONTRAKTO en ĉio ĉi.

La mizero de la terkulturistoj kontraŭe konsiderinde malkreskis dum la regado de Ludoviko XVa, ĉar oni multe progresis : oni enportis kaj kulturigis la terpomon, oni forlasis la kutimon pri novalo kaj anstataŭis ĝin per kulturalternado, kio sole estas gajno de almenaŭ 30 % en rikolto. En 1789a, la riĉiĝintaj kamparanoj posedis la duonon de la agro-areo. Nekontesteble ni tiam perdis per milito grandareajn koloniojn en Hindujo kaj Kanado. Kaŭzoj estis materiaj kaj psikaj. Unue, ni pro tro granda ŝparo lasis ŝrumpiĝi niajn militfortojn kiujn ni nur rekonstruis ekde 1763a (GRIBEAUVAL, ktp). Due, la bankroto de LAWS estingis ĉian entuziasmon por tiuj malproksimaj landoj, kaj ĉiajn iluziojn pri tuja profito pri ili. La ĝenerala

opinio (de VOLTAIRE ĝis CHOISEUL) estis, kontraŭ la britoj, prefere cedi alie por ŝirmi la sukero-insulojn (Antiloj).

Sed tamen, finfine, ĉe la morto de Ludoviko XVa, la reĝolando estis pli vasta kaj pli riĉa ol antaŭe : oni estis akirinta Korsikion kaj Lorenon, tio sen gravaj militoj, kiuj ĉiuj okazis ekstere, lasante la landon mem en paco. La reĝo estis mem pacema : jen kion li diris post FONTENOY al sia filo « vidu kiom kostas al bona koro por akiri venkojn ; la sango de niaj malamikoj estas ankaŭ homa sango. La vera gloro estas ĝin ŝpari ». La internacia politiko celis la Eŭropan ekvilibron (subteno al Aŭstrolando kiam tiu fariĝis malpli forta ol Pruslando), sed pacema : tiel, CHOISEUL spite multaj antaŭaj sukcesoj estis eksigita ĉar lia agado riskis okazigi militon kun Britlando pro la Falklandinsuloj.

La interna politiko estis entute eksterordinare progresema kaj moderna. Oni iniciatis la laŭenspezan impoŝton aplikotan al ĉiuj, popolanoj, nobeloj kaj klerikoj ; (estas vero ke la klerikaro sufiĉe bone rezistis por fine nenion pagi), oni anstataŭis la privatan juĝistaron per magistratoj, tiel ke la juĝado fariĝis senpaga (Reformo de MAUPEOU). Kompreneble, ĉiuj reformoj lezis multajn privilegiojn, kaj ekestis granda bruo kaj baraktado. En la fino, inter la plej incitaj estis CHOISEUL kiu ne pardonis sian eksigon : ne senkaŭze la supozita « Malsatiga kontrakto » kaj lia eksigo datumas ambaŭ de 1770a. Ĉar estis malfacile ataki la reĝon, rekte, li atakis Madame du BARRY, kiu tiel senhonte kaptis oficon por kiu CHOISEUL mem proponis sian propran fratinon Beatrix de CHOISEUL STAINVILLE, dukino de GRAMONT... Choiseul, la nobeluloj, la klerikoj, la parlamentanoj (envere privataj juĝistoj, neniel elekte voĉdonitaj), tio estis multe da homoj kiuj laŭte parolis, kriis, kaj incitis la popolon al ribelo ; FRONDO estis facila en Francujo. Oni ankaŭ multe skribis, kaj laŭdire, se la paroloj forflugas, la skriboj restas.

Verŝajne pro tio, la memoro pri LUDOVIKO XVa estis ĝis proksima tempo nekontrole tiom malbonfama. Longtempe oficiala historio estis en Francland terure konformisma, oni ne tiom serĉis malkovri ankoraŭ ne sciitajn faktojn, aŭ kialojn, kiom konfirmi siajn kredojn. Oni ne rimarkis ke la fasadaj bataloj kontraŭ favoritino kaj diboĉado — kaj inter la atakantoj estis ankaŭ famaj diboĉuloj — fontis en realeco el opono al reformoj. Tiuj reformoj estos poste truditaj en sango far la posta revolucio ; oni povas do revi, kaj pensi, ke se la posta reĝo estus firme teninta ilin, eble la sekva revolucio ne ekestus kun la sinsekvo de konvulsioj. Kio al la senpera atestanto TALLEYRAND inspiris diri : « kiu ne vivis antaŭ 1789a ne povas scii kio estis vivdolĉeco ».

J. MANCEAU.

◆◆◆◆◆◆◆

KIAM DUBAS ESPERANTISTO

Ni, esperantistoj, estas raso de homoj aparta. Nia universo, niaj rilatoj kun la mondo, niaj problemoj ne estas similaj al tiuj de aliaj homoj. Evidentaĵo, vi diros. Jes, sed mankas, laŭ mia sperto, sufiĉe ampleksa studado de la psikologio de Esperantisto. Kia homo li estas ? Kial ? Kiujn problemojn psikajn li havas ? Kiaj rilatoj estas inter la movado kaj la individuo ? Ekzemple, dum mia vivo de esperantisto, mi ofte sentis la bezonon legi studojn, aŭ nur raportojn pri la psikaj — mensaj — fundamentoj de esperantista paro ; pri la familiaj rilatoj en esperantista hejmo ; pri la evoluo de Esperantisto dum sia tuta vivo en siaj rilatoj kun esperanto ; pri la valoro de Esperanto ĉe tiuj kiuj subite troviĝas solaj kaj liberaj aŭ kiuj spertis nervan malsanon...

Unuvorte, mi ĉi-sube proponas al la legontoj rapidan studon de la sento « DUBO » ĉe esperantisto. Mi esperas, ke ideoj venos al la legintoj, ĉu komentoj pri la sintenoj priskribitaj en la artikolo, ĉu bezono siavice priskribi aliajn tipajn trajtojn de la esperantista psikologio.

H. KRISTOS.

Ĉio komenciĝis iun vesperon, kiam vi tre malgaje malkovris, ke, jam por la tria semajno, vi ne povos ĉeesti la ĉisemajnan kunvenon de via esperantista klubo ? Antaŭe, la unuan fojon, via fileto ne tre bone fartis ; la duan fojon, vi timis, ke la veturilo ne bone funkcios ; kaj ĉivespere, vi subite sentis grandan emon al dormo. Vi do telefonis la grupon, ke vi ne povos ĉeesti, kaj vi tuj enlitiĝis. Sed tie, la problemo vin atakis, trafe, rekte al via bona esperantista memo : via honesta, inteligenta, vigla cerbo tuj malkovris, ke vi ne plu deziras ĉeesti la kunvenojn. Vi pensis : « Jes, vere. Mi eĉ ne komprenas, kial mi tiom longe suferis tiom da perditaj horoj en tiuj kunvenoj ! Perditaj — jes ! Nenion riĉigan mi trovis en ili ! Nur babilado ! en la franca ! pri ĉio, sed ne Esperanto ! Vere, mi estas alia tipo de esperantisto ol tiuj de la klubo ! Ili amas Esperanton pro iu stranga kaŭzo : ĉar la mortinta edzo estis esperantisto ; ĉar « se ne mi, kiu ĉeestus la kunvenojn ? » ; ĉar ili estas okazo renkonti amikojn, precipe dum la bankedo de la Zamenhofa tago ; ĉar la klubo pagis al ŝi vojaĝon al la kongreso pasintjare, kaj ŝi ne rajtas esti maldankema ; ĉar li esperas, ke al li ĉijare la klubo pagos la vojaĝon al la kongreso... k.t.p.

Fi ! Ne vi estas tia ! Vi ĉeestis la kunvenojn ĉar vi amis Esperanton. Vi konsideris, ke Esperanto estas parto de via vivo. Do, vi facile komprenis, ke tiaj kunvenoj, tiaj amikoj ne taŭgas por via pura idealo kaj altnivela Esperanto. Ili eĉ ne aŭskultis viajn konsilojn pri gramatiko, kaj ne interesiĝis pri viaj proponoj !

Jen do la unua paŝo de via dubado.

Dua paŝo : post kelkaj semajnoj, vi konstatis, ke jam de unu monato vi ne daŭrigis la leteron kun vi estis promesinta al tiu ne-esperantista sed eble esperantistiĝonta amiko. Honto ! Via kapo estas tro klarvida por flustri al vi : « vi ne havis tempon ». Vi tuj komprenis, ke nur plua paŝo en la direkto de seninteresiĝo estis farita. La tutan tagon, vi turnadis inter viaj fingroj tiun ĝenantan demandon : « ĉu mi ne plu amas Esperanton ? ». La tutan nokton, kun grava mieno, fermita buŝo, apud

malkontenta edzo/edzino, vi penadis por respondi tiun gravan demandon. Vi revidis vian esperantistan vivon dum la ĵus pasintaj monatoj. Kaj kion vi vidis ? Multegajn klopodojn ; multegajn bonajn ideojn ; multegajn horojn de laboro... ĉu ĉio vane ?

Viaj klopodoj ! ...Vi rememoris la kursojn kiujn vi gvidis ĉisomere. Ĉu unu el viaj maljunĝantaj afablaj lernantoj iel profitis de tiuj tedaj kursoj ? Vi estas certa, ke ne ! Vi ne kontentiĝas je la tipa memkonsola ideo de ĉiu profesoro : « Ni semas kaj semas, neniam laciĝas... Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas » kiu aldonas « sed iam, unu semo kreskos ». Ne ! Ne vi ! Vi scias, ke tio estas nur konsolo, utopio. Vi sufiĉe konas la metion de instruisto por scii kiam estas fiasko. Fiasko !

Viaj bonaj ideoj ! Vi estas juna, inteligenta, agema — kaj ĉe vi svarmas bonaj ideoj. Vi jam estas sufiĉe amara tamen, por scii, ke vi mem devas realigi viajn bonajn ideojn, ĉar amikoj sekrete ĵaluzas kaj forpuŝas viajn. Vi do multe laboris por verki tiun promesitan artikolon, por traduki tiun belan tekston de Colette, por starigi tiun ekspozicion, por finprepari tiun sonbendan kurson... Ne helpon vi bezonis, sed kuraĝigajn vortojn... Kia seniluziiĝo ! Via artikolo neniam aperis... perdiĝis ; neniu vizitis vian ekspozicion ; neniu esperantisto diris al vi, ke li eĉ legis vian tradukon de Colette... Jen kial vi ne finskribis tiun leteron !

Viaj perditaj horoj de laboro ! En viaj oreloj resonas la voĉo de via patrino : « Neniam estas perdita horo de la laboro ». Vi amare ridetas : vi ne sekvas tiun filozofion, laŭ kiu laboro havas valoron en si mem. Vi havas pli pozitivan vidpunkton : nur la rezulto, nur la profito de laboro donas valoron al la laboro mem. Kaj pri viaj multegaj horoj de laboro por Esperanto, vi ne povas dubi : vanaj ! perfekte senprofitaj !

Dum tiu sendorma nokto, vi faris pluan paŝon for de Esperanto. La trian !

Vi decidis peti la konsilojn de tre karaj esperantistaj amikoj ; kiel malsanulo kiu fine konsentas viziti kuraciston, tiel agnoskante por la tuta mondo, ke li estas malsana.

Vi rakontis la tuton al via edzo/edzino. « Kia malhumila esperantisto vi estas ! Li/ŝi kriis. Kaj iom stulta ! ĉu vi vere kredas, ke via agado havas tiom da valoro ? ke la aliaj bezonas viajn konsilojn kaj atendas viajn bonajn ideojn ? Vidu ! Vi eĉ ne perfekte regas la gramatikon ; mi legis vian tradukon de Colette kaj ne komentis ĝin al vi ĉar kelkaj frazoj estas vere nekorektaj !Kredu min, ne esperu, ke la tuta esperantistaro ploros kiam vi forlasos la movadon. Provu... Ne plu agu por Esperanto kaj diru al mi kiom da homoj tion rimarkos. Mia kara, vi nepre devas lerni humilecon... ». Vi ne konsentis aŭskulti plu, kaj vizitis tiun maljunan membron de la klubo, esperantisto de 50 jaroj, kiu neniam en sia esperantista vivo baraktis kontraŭ iu ajn dubo (vi sekrete kredas, ke Zamenhof estis tia). Afable, li aŭskultis vin, kaj nur respondis : « Mi komprenas, ke vi estas tre malfeliĉa. Atendu ! La problemo solviĝos, iel. Sed promesu al mi : se vi iam ne plu amas Esperanton, ne hontu pri tio ». Vi balbutis « sed ...li diris... 'nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante' ...mi ne volas senti min renegato ». Li preskaŭ koleris : « ne ! mi prefaras vin eksesperantisto ol mola esperantisto ». Poste, vi skribis longan leteron al via unua esperanto profesoro, via tre kara maljuna mastro. La respondo venis : « Nur stultuloj neniam dubas. Mi estas kontenta, ke vi tion rakontis al mi. Vi evoluas ; via esperantista idealo nun fariĝas plenkreska. Post tiu krizo, vi estos bona, kompleta, hardita esperantisto... aŭ nenio ».

Dum longaj tagoj, vi meditis tiun leteron.

Kaj iam, vi faris la lastan paŝon. Pluraj monatoj estis pasintaj, dum kiuj la movado tamen bone vivadis sen via helpo. Iun matenon, vi skribis al via maljuna profesoro : « Nun, mi certe scias, ke mian tutan vivon mi restos esperantisto. Mi decidis, ke de nun, mi agados por nia Afero laŭ tute nova direkto : sola, laŭ mia propra ritmo, kaj la dankojn mi esperos nur de mi mem ; tial, mi ne plu instruos esperanton, mi ne plu interŝanĝos kun aliaj. Mi agos kaj sekrete diros al ĉiuj : 'mi estas tia, mi faras tion, se tio interesas vin, estu bonvena, se ne, lasu min, mi daŭrigas' ». Kaj tiun saman tagon, vi verkis artikolon pri la psikologio de esperantisto. Vi elektis titolon kiu bone sonis en viaj oreloj : « kiam dubas esperantisto ». Tuj post ĝia apero en la revuo, vi ricevis plurajn leterojn : kelkaj rediris la vortojn de via edzo/edzino, aliaj la vortojn de la maljuna membro de la klubo, kaj aliaj, la parolojn de via maljuna mastro... Vi daŭrigis laŭ via vojo.

◆◆◆◆◆◆

Artefaritaj Paradizoj ... ankaŭ por bestoj

Sur la vojoj al Katmandu ne nur la homojn oni renkontas, sed ankaŭ la bestojn, kiuj toksiĝas per opio, alkoholo, tabako, L.S.D., haŝiŝo, kafeino kaj india kanabo. Studo de ilia kondutado, eksperimentoj ĉe diversaj toksomanioj, permesas klarigi la kompleksan mekanismon de la dependeco al drogo. Ofte la superaj estaĵoj, kiuj ni estas, konsideris la kemian ebriecon kiel rimedon por aperigi genion aŭ por forgesi zorgojn kaj ĉagrenojn. Tamen ŝajnas, ke la plezuroj de tiuj halucinigoj, la fantasmagorioj de tiu fantazia mondo allogas ankaŭ bestojn, vertebrulojn kaj senvertebrulojn.

Dum la vinberrikoltoj turdoj kaj precipe merloj, supersatiĝinte per sukplenaj vinberoj, estas ebriaj : la populara esprimo « ebria kiel turdo » estas ĝusta bildo. En Normandio, la kokinoj, nebezonante nian helpon, glutas, ĝisebrie, pom-rekrementon ; ili zigzage kuras kun la okuloj eltiritaj.

La lukanoj, dikaj koleopteroj ebriiĝas per la suko de kverko kaj la larvo de kurkulio per tiu de la salikfolioj.

En Nord-Meksikio kaj Sud-Usono ĉevaloj kaj ŝafoj malmodere gresmanĝas astragalojn similajn je trifolio : sekve fronte al plej malgranda obstaklo ili faras grandegajn saltojn kaj dum horoj rondiras.

Tiuj bestoj, kiuj jam gustumis tiujn plantojn, preterpasante ilin, deflankiĝas de la brutaro por ilin manĝi.

En Aŭstralio kelkaj papagoj ebriiĝas per nektaro ; supersatiĝinte ili falas pieden de la arboj ; tuj de ilia veko, ili reiras al tiu nektaro.

La eŭropaj genistoj enhavas potencan alkaloidon : la « sparteinon » ; la ŝafoj plej ŝatas tiujn plantojn kaj ilin manĝegas ; poste ili ekdormas kaj fariĝas facila predo por la vulpoj ; pro tio la ŝafistoj timas geniston kiel peston.

En Sud-Afriko, kiam la beroj de la « marula » -arbo ekfermentas, vera frenezo-vento blovas sur la savano ; la elefanto fariĝas akrobato por atingi la berojn de tiu arbo ; ankaŭ la pavianoj sin ĵetas sur tiujn berojn ĝis evidenta ebrieco.

Sud-Afrika biologo, Eugène Marais, multe studis la bestajn toksomaniojn ; precipe ĉe « ŝakma-o », robusta paviano en aŭstrala Afriko. En tiu regiono, arbo el la « cikadalo » -grupo produktas tre venenajn fruktojn, kiuj neniam estas manĝataj de bestoj, escepte de la « ŝakma-oj ». Laŭ la diroj de la tieaj loĝantoj, tiuj pavianoj organizas verajn ekspediciojn por senfruktigi tiujn arbojn ; poste ili ŝanceliĝas kaj nekapablante forkuri restas je la dispono de la ĉasistoj.

En multaj regionoj la ĉasistoj ŝmiras siajn sagojn per drogoj eltiritaj el alkaloidaj plantoj por endormigi la ĉasaĵon ; la plej konata estas la kuraro uzata en Sud-Ameriko. La Indianoj ankaŭ ĵetas en la riverojn radikojn de « Lonchocarpus » ; poste ili povas facile kapti la dormantajn fiŝojn, kiuj flosas ĉe la surfacaĵo. Eĉ la Galloj ŝirmis siajn sagojn per la blanka eleboro ; la legendo diras, ke ili malkovris ĝian kontraŭvenenon vidante korvon, kiu manĝis sovaĝan ajlon post eleboro-glutado. Kial ne ?

La belga zoologo Bernard Heuvelmans proponis interesan eksperimenton en Zoologia Ĝardeno ; li donis ment-bombonon al elefanto ; tiu ĉi montris grandan plezuron ; ĝi metis sian rostron sur la bordon de sia kaĝo kaj abunde salivumis ; poste, senpacience ĝi atendis tiujn ment-bombonojn ; oni povas pensi, ke ili rompis la monotonecon de ĝia nutrado ; povas ankaŭ esti, ke ili memorigis al ĝi la ebriigajn plantojn de la savano. En Eŭropo la « nepeta », aŭ kat-herbo, eligas ment-odoron, kiu allogas la katojn.

Ne nur vinberoj, genisto aŭ mento allogas la bestojn, sed ankaŭ veraj drogoj kiel opio. En sia libro « Opio » Jean Cocteau priskribas bestojn en opio-fumejo : « la muŝoj ariĝas ĉirkaŭ la pleton kaj revas ; la salamandroj alkroĉiĝas ĉe la plafono per siaj duon-gantoj kaj duonsvene atendas la momenton ; la musoj alproksimiĝas kaj mordetas la morfin-restaĵon en la cindroj. En Marsejlo, ĉe la Anamanoj, -ĉe kiuj oni fumas helpe de materialo taŭga por konfuzi la policanoj-, la blatoj kaj araneoj formas cirklon kaj ekstaziĝas ».

En Sud-Ameriko la igvano ne rezistas al logo de la india kanabo : kelkaj Indianoj ĉirkaŭas lacerton kaj unu post la alia fumas marijuanon en la sama pipo, kiu pasas de mano al mano ; allogita de la fumo-odoro la reptilio ĉirkaŭiras la pipon ĝis ĝi ekdormas ; je tiu signalo (sendube alarm-signalo) la Indianoj ĉesas fumi kaj forlasas la pipon.

La fumo-bano

Aliaj kazoj prezentiĝas ĉe kiuj la bestoj uzas ne plu drogon sed plej diversajn aĵojn kaj eĉ aliajn bestojn. Malgranda cebo bredita de B. Heuvelmans ŝmiris sian felon per tabako, kiun ĝi trovis ĉe cigared-stumpoj ; eĉ kelkfoje ĝi banas sin en fumo kun granda plezuro ; samtempe ĝi urinas kvazaŭ ĝi volus neniigi la fum-odoron.

Oni rimarkis, ke birdoj ankaŭ ŝatas la fumo-banon ; tial monedoj kaj sturnoj sin lokas supre de la kamentuboj. En Aŭstralio la fringoj tordiĝas en la fumo ; eĉ tiu kondutado iĝas tiom kontaĝe ebriiga, ke oni vidas la aliajn fringojn (kiuj ne estas en la fumo), sammaniere tordiĝi.

Jen alia fenomeno, preskaŭ nekredebla sed aŭtentika kaj filmita de la angla zoologo D-ro Maurice Burton : la fajro-bano. La plejmulto el la bestoj timas la fajron : incendioj en arbaroj okazigas frenezan forkuron. Nur la frugilego-korvo, kiu kolonie nestas en arbaro kaj dum vintro vivas en grandegaj bandoj sur la kampoj, sin dediĉas al eksterordinara rito. La frugilego sin ĵetas sur la fajran ŝtiparon kaj dancas super ĝi kun etenditaj flugiloj ; nur kelkaj plumoj estas iom brulitaj. La korvo tiom multe deziras tiun fajro-banon, ke, post mallonga lernado, ĝi povas krakigi alumeton per sia beko por ekbruligi sian ŝtiparon.

Formiko-bano por la birdoj

Longtempe oni konsideris tiun formiko-banon kiel fabelon ; tamen jen kelkaj rimarkoj : garolo, sturno aŭ meleagro etendiĝas sur formikejon, ekstaras, etendas siajn flugilojn kaj mallevas la kapon ; la birdoj lasas la formikojn ĝin invadi aŭ ĝi prenas ilin unu post alia por ilin meti inter siajn plumojn ; poste ĝi ŝajnas turmentita de viva ekscitiĝo ; kion tio signifas ? Oni esprimis diversajn hipotezojn :

— la formikoj purigus la plumaron de la birdo, forigante la parazitojn ;
— la formika acido stimulus la haŭton de la birdo ; aŭ la formika odoro plaĉus al la birdo (sed oni scias, ke birdoj havas tre malbonan flarsenton) ;
— eble estas nur la formiko-tiklo, kiu estas agrabla al la birdo.

Tamen aliaj rimarkoj alimaniere montras la problemon :

Efektive oni vidis kornikon, kiu dancis sur naftalino-buloj ; aliaj preferas citrono-ŝelon, vinagron, raŭpojn K.T.P. ; iu garolo plej plezuriĝis ĉe ŝprucado de oranĝo-suko eĉ kraĉi sur sin mem !

La erinaco eksalivumas, stariĝas sur siaj malantaŭaj piedoj kaj per sia lango, plej multe eltirita, etendas tiun ŝaŭmantan salivon sur ĉiuj atingeblaj partoj de sia korpo ; ĝenerale tiu operacio daŭras nur kelkajn sekundojn ; sed ĝi po-

vas daŭri 20 minutojn ; ne ĉiuj erinacoj havas tian sintenadon ; kelkaj nur unu fojon tion faras ; aliaj ĝin refaras ĉiun tagon eĉ dum sia tuta vivo (kvazaŭ incitiĝemo al drogo varius laŭ la individuoj, kiel okazas ĉe la homoj) ; tia sintenado ne estas antaŭvidebla sed ŝajnas, ke ĝi povas esti okazigata de proksima ĉeesto de plej diversaj objektoj : tegolo, vernisita ligno, bufo-haŭto.

Saman fenomenon oni rimarkis ĉe simioj kaj lemuroj, kiuj ŝmiras sian felon per onoj de ajloj, kies fortan guston ni konas.

Unika fakto en la monda besto : la formiko drogiĝas pere de aliaj bestetoj ; ili bredas afidojn aŭ koĉenilojn por profiti iliajn sukeritajn sekreciojn ; tiuj insektoj nutriĝas per la sukerita suko de vegetaloj ; tiu sukero pasas en la ekskrementojn de la afidoj ; ĉar la formikoj multe frandas sukeraĵojn, ili observas la koĉenilojn sur la brancoj ; por inciti ilin al eligado de la « mielat-o » la formikoj tiklas per siaj antenoj ilian abdomenon ; poste, avide ili glutas la gluecan guton eligita de la afido ; oni kalkulis, ke formikejo loĝata de cent mil « laboristinoj » tiamaniere kolektis dekon da kilogramoj de sukerita nektaro. Tiu bredado estas perfektigita laŭ la specioj : la « laboristinoj » transportas siajn afidarojn sur plantojn plej saturitajn je suko ; aliaj metas tiun brutaron en loĝioj el kartono aŭ tero, ŝirme de iliaj malamikoj. Tiu emo al sukeritaj substancoj kondukas al ebrieco la formikojn, kiuj ŝanceliĝas, fariĝas neagemaj kaj forlasas siajn larvojn, same kiel la alkoholuloj forlasas sian hejmon ; tiu sintenado estas unu el la plej kompleksaj en la besta mondo.

Drogitaj de la homoj

La homoj (ĉasistoj, haŝiŝo-fumantoj), intervenis por okazigi tiun drogadon ; pro diversaj celoj, ofte profit-donaj, la homoj drogas bestojn : bredad-hundoj aŭ kur-ĉevaloj ; en Afganlando la ĉas-agloj estis dresitaj per opio, dum en Meksikio lukto-kokoj kaj lukto-taŭroj estas stimulitaj per india kanabo. Por kontroli tiun fraŭdon oni devas flari la spiradon de la bestoj — almenaŭ tiun de kokoj ĉar kuraĝuloj estas raraj por kontroli tiun de taŭroj.

J. L. Brau rakontas pri kato de opiomaniulo : ĉiuvespere li venis por spiri, kun granda plezuro, la fumon de la pipo de sia mastro. Oni notas ankaŭ, ke estas pantero, kiun mandareno sukcesis igi opiema.

Antaŭ kelkaj jaroj en la Montmartra Kabareto « La lama Anaso » oni montris anason drogitan per kokaino : antaŭ la prezentado, senigita je tiu drogo, la anaso estis tute sinkita kun senbrilaj okuloj ; sed tuj kiam oni donis al ĝi pinĉoprenon da kokaino ĝi revigliĝis kaj iris de kliento al kliento por peti la reviglantan drogon.

Aliaj bestoj fariĝis toksiĝemuloj por la bezonoj de la Scienco. En laboratorioj oni studas la efikojn de la drogo, precipe tiun de L.S.D. ; post ĝia sorbo la hundo salivumas kaj rigidiĝas ; la kato furiozas ; la fiŝoj fariĝas pli atakemaj dum la ratoj nur plej malfacile povas grimpi ; la akvoheliko ondomove flosas.

Aliflanke L.S.D. ŝajnas plibonigi la psikajn kapablojn de kelkaj bestoj ; ekz : la kolomboj, kies « bird-cerbo » estas konata, plibone respondas al la testoj. Eksperimentoj sur araneoj estas jam klasikaj : se oni metas guton de drogo sur araneaĵon, la araneo ĝin glutas ; se estas « pervitino », kiu stimulas la nervan sistemon, la araneo iĝas pli malpaciema kaj ĝia araneaĵo estas nekompleta ; sub ago de Kloralo-glukozo, kiu havas hipnotan efikon kaj stultigas la beston, la araneaĵo estas plej rudimenta.

La kafeino igas la reton plej malregula ; sub efiko de « meskalino » — famigita de la eksperimentoj de la poeto H. Michaux — la araneo teksas reton nenormale malgrandan. L.S.D. okazigas plej perfektan araneaĵon.

Simioj estas plej emaj al toksikomanioj : ili plej ŝatas tabakon, kiun ili manĝas aŭ maĉas, kiel perfektaj kompetentuloj. Kontraŭe, kiam ili estas liberaj, ili povas trairi tabako-kampon ne atentante ĝin ; ĉimpanzoj fumas cigaredon aŭ pipon kelkfoje kun homaj mienoj.

Hereda alkoholismo

E. Marais rimarkis, ke ĉe « ŝakama-oj », cerkopitekoj, fakoĉeroj kaj antilopoj, sorbo de alkoholo diluita en akvo, kaj post longaj intertempoj ne okazigas perturbojn ; tamen se la alkoholodozoj estas regule pliigataj, kaj se la intertempoj estas mallongigitaj, la perturboj iĝas pli gravaj : la bestoj ne plu dormas, malgrasiĝas, tremas, ploraĉas ; sufiĉas, ke oni redonu alkoholon al la bestoj por ke tiuj simptomoj malpliiĝu aŭ ĉesu ; la simioj bone scias, ke alkoholo povas ĉesigi iliajn suferojn psikajn kaj fizikajn. Eksperimentoj ĉe ratoj kaj musoj montris la heredan karakteron de alkoholismo ; efektive kelkaj sinsekvaj familioj de ratoj montras fortan emon al alkoholo kaj ruĝa vino ; kontraŭe aliaj montras fortan malemon al alkoholitaj trinkaĵoj. Tiuj eksperimentoj pruvis, ke emo aŭ malemo al alkoholo varias laŭ la agemeco de hepato-enzimo ; ĉe ratoj kaj musoj sorbo de meskalino, anfetamino, L.S.D., okazigas gravajn perturbojn eĉ ĉe konstruo de iliaj nidoj, kiujn ili ofte forlasas.

Oni konstatis, ke drogitaj bestoj ne plu povas resti sen drogo : oni montris al simioj kiamaniere inokuli al si men drogon : ili sukcesis puŝi la levilon de la aparato, kiu inokulas al ili la drogon ; ili pli kaj pli ofte funkciigas la levilon, ĝis ili konvulsias ; tuj kiam tiuj konvulsioj ĉesas, ili denove funkciigas la levilon, ĉiam pli ofte kaj pli grand-kvante.

Konklude, fumo-bano, fajro-bano, emo al drogo-plantoj ŝajnas por la bestoj pli ol ludoj. La eksperimentoj igas pensi, ke la bestoj estas allogataj de halucinigoj ; tamen tio restas homaj konkludoj kaj nenio preciza povas tion certigi.

Pli certe oni povas diri, ke ĉe vertebruloj kaj senvertebruloj nur la bestoj kun kompleksaj nervaj strukturoj kapablas toksikomaniojn.

S. GUILLOT.

LA KAPRINO DE S-ro SEGUIN

S-ro Seguin (sögen) neniam estis feliĉa pri siaj kaprinoj.

Li perdis ĉiujn sammaniere : iun matenon, ili rompis sian ŝnuron, foriris al la monto kaj tie, la lupo manĝis ilin. Nek la karesoj de l'mastro, nek la timo al la lupo, nenio detenis ilin. Ili estis, laŭdire, sendependaj kaprinoj, kiuj nepre postulas plenaeron kaj liberecon.

La bona S-ro Seguin, kiu nenion komprenis pri la karaktero de siaj kaprinoj estis konsternita kaj diris :

— Estas finite. La kaprinoj enuas en mia bieno ; mi neniam konservos eĉ unu !

Tamen, li ne senkuraĝiĝis kaj perdinte ses kaprinojn, li aĉetis sepan ; sed ĉi foje, li atentis pri tio, preni ŝin tre juna por ke ŝi alkutimiĝu pli facile al restado ĉe li.

— Ha ! Gringorio, kiel bela estis la kaprineto de S-ro Seguin ! Kiel bela kun siaj mildaj okuloj, sia barbeto de suboficiro, siaj nigraj kaj brilaj hufoj, siaj striaj kornoj kaj siaj longaj blankaj haroj, kiuj formis mantelon por ŝi. Tio estis preskaŭ tiel ĉarma kiel la kaprineto de Esmeralda, ĉu vi memoras, Gringorio ? — kaj obeema, karesema, permesante la melkadon senmove, ne metante la piedon en la vazon ; vere adorinda kaprineto !

Malantaŭ sia domo, S-ro Seguin posedis terenon ĉirkaŭitan de kratagoj. Tien li metis la novan loĝantinon. Li ŝin ligis ĉe fosto, ĉe la plej bela loko sur la herbejo, zorgante, ke ŝi havu longan ŝnuron kaj de temp'al tempo li venis esplori ĉu ŝi estas komforta. La kaprino sentis sin tre feliĉa, manĝis la herbon tiel plezurege, ke S-ro Seguin estis ravita.

— Fine, opiniis la kompatinda viro, jen unu, kiu ne enuros kun mi. S-ro Seguin eraris ; lia kaprino enuis.

Iam, ŝi pensis, rigardante la monton :

— Kiel agrable devas estis ĉe la supro ! kia plezuro saltadi en la erikejo, sen tiu malbeninda ligilo, kiu vundas mian kolon !... Konvenas al la azeno aŭ la bovo manĝi la herbon de tiu tereno !... Sed la kaprinoj bezonas spacon !

Ek de tiu momento, la herbo de la ĝardeno ŝajnis sengusta al ŝi. Enuo invadis ŝin. Ŝi malgraŝiĝis, ŝia lakto malabundis. Estis vere kompatinde vidi ŝin tiri sian snuro la tutan tagon, kun okuloj al la monto kaj nazo malfermita, blekante « Me » ! ...senĝoje.

S-ro Seguin rimarkis ja, ke lia kaprino kondutas nenormale sed li ne povis trovi la kaŭzon. Iun matenon, kiam li finis ŝian melkadon, la kaprino sin turnis al li :

— Aŭskultu, Sinjoro Seguin, mi enuas en via hejmo, permesu al mi iri en la monton

— Ha ! Dio mia ! ...Ankaŭ ĝi, laŭtigis Sinjoro Séguin, kiu pro emocio, faligis la vazon ; poste, sidante sur la herbo, apud la kaprino :

— Ĉu vere, Blanquette (blanket) ? vi volas forlasi min !

Kaj Blanquette respondis :

— Jes, Sinjoro Seguin.

Ĉu herbo mankas al vi, ĉi tie ?

— Ho ! ne, sinjoro Seguin.

— Eble, via ŝnuro estas tro mallonga ; ĉu mi plilongigu ĝin ?

— Estas senutile, Sinjoro Seguin.

— Tiam, kion vi bezonas ? Kion vi deziras ?

— Mi volas iri al la monto, Sinjoro Seguin.

— Sed, malfeliĉino, ĉu vi ne scias, ke, sur la monto, vivas la lupo... Kion vi faros kiam li venos ?...

— Mi batos lin per miaj kornoj, Sinjoro Seguin.

— Viaj kornoj ne timigos la lupon. Li manĝis plurajn kaprinojn miajn, kun kornoj pli potencaj ol la viaj... Vi ja scias, ke la bona maljuna Renalda, kiu vivis ĉi tie lastjare, impona kaprino forta kaj defendiĝema kiel virkapro. Ŝi batalis kun la lupo la tutan nokton... kaj ĉe l'mateniĝo, la lupo formanĝis ĝin.

— Pekajre ! Kompatinda Renalda. Ne gravas, Sinjoro Seguin, lasu min iri al la monto.

— Dio bona ! ...eksplodis Sinjoro Séguin, sed kion oni faris al miaj kaprinoj ? Unu plia kiun la lupo formanĝos. Nu, ne ! mi savos vin kontraŭ via volo, petolulino kaj timante, ke vi rompos la ŝnuron, mi metos vin en la ĉevalejon kaj tie vi restos ĉiam.

Senatende, Sinjoro Seguin kunprenis la kaprinon en ĉevalejon tute senluman, kies pordon li duoble ŝlosis Bedaŭrinde li forgesis la fenestron kaj apenaŭ li estis foririnta, ke la etulino malaperis.

— Vi ridas, Gringorio ! Kompreneble ! Mi vidas tion ! Vi aprobas la kaprinojn kontraŭ tiu bona Sinjoro Seguin !... Ni vidos ĉu poste vi kuraĝos ridi !

Kiam la blanka kaprino atingis la monton, ekestis plena ravo. Neniam antaŭe, la maljunaj abioj vidis ion tiel belan. Oni bonvenigis ŝin kiel etan reĝinon. La kaŝtanarboj kliniĝis ĝisteren por ŝin karesi per la ekstremaĵoj de la branĉoj. La orkoloraj genistoj disfloris ĉe ŝia trapaso kaj odoris kiel eble plej bone. La tuta montaro festakceptis ŝin.

Imagu, Gringorio, kiel feliĉa estis nia kaprino ! For ŝnuroj kaj fosto ! Nenio nun malebligis ŝian saltadon kaj paŝitiĝon laŭplaĉan ! Multe da herbo ja kreskis tie, ĝis super la kornoj. Kara amiko ! Kaj kia herbo ! Bongusta, delikata, konsistanta el mil plantoj. Estis tute alia manĝaĵo ol la gazono de la tereno. Kaj kion diri pri la floroj !... Altaj kampanuloj bluaj, purpuraj digitaloj longkalikaj, tuta aro da sovaĝaj floroj ellasantaj ebriigajn sukojn !...

La blanka kaprino, duonebria, sternigis tie, kun kruroj levitaj kaj ruliĝis laŭlonge de la deklivoj, miksite kun la falintaj folioj kaj la kaŝtanoj... Kaj subite, ŝi rektigis unusalte sur siaj kruroj. Hop, Nun ŝi forkuras antaŭen al la makisoj kaj la buksejoj, jen sur montpinto, jen funde de ravino, supre, malsupre, ĉie... Oni supozus, ke sur la monto, kuradas dek kaprinoj de Sinjoro Seguin.

Fakte, ŝi timis nenion tiu Blanquette.

Unuimpete, ŝi transsaltis larĝajn torentojn, kiuj ŝin plaŭdis, ĉe l'paso per malseka polvo kaj ŝaŭmo. Tiam ; kvazaŭ ŝvitanta, ŝi etendiĝis sur plata roko kaj la suno sekigis ŝin... Iam, irante ĝis la ekstremo de altebenaĵo, kun citza floro en buŝo, ŝi vidis en la malsupro sur la malaltkampoj, la dometon de Sinjoro Seguin, kun la tereno. Tio ridigis ŝin.

— Kiel eta ! ŝi rimarkis ; kiel mi povis vivi tie ?

Kompatinda etulino ! Vidante sin tiel alte, kaj sidante, ŝi opinis sin tiel alta kiel la mondo.

Entute, estis bona tago por la kaprino de Sinjoro Seguin. Ĉirkaŭ tagmeze, kurante disen, ŝi renkontis grupon da ĉamoj plenbuŝe manĝantaj lambruskon. Nia eta blanke vestita amikino sensaciis. Al ŝi oni cedis la plej avantaĝan lokon ĉe la lambrusko kaj ĉiuj ĉamsinjoroj kondutis tre galante. Oni flustras eĉ — sed tio restu sekreto inter ni, Gringorio — ke juna ĉamo nigrahara estis bonŝanca por plaĉi al Blanquette. La du geamantoj retiriĝis en la bosko, unu aŭ du horojn, kaj se vi deziras scii kion ili diris unu al la alia, demandu la babilemajn fontojn, kiuj nevideble diskuras en la musko.

Subite, la vento fariĝis pli malvarmeta la montaro ekaspektis violkolora.

— Jam ! surpriziĝis la eta kaprino kaj ŝi haltis, mirigita.

Malsupre, nebuleto inundis la kamparon. La tereno de Sinjoro Seguin malaperis kaj el la dometo oni povis distingi nur la ruĝan tegmenton kun iom da fumo. Ŝi aŭskultis la sonoriletojn de rehejmiĝanta brutaro kaj sentis grandan malgajecon. Revenanta girfalko preskaŭ tusis ŝin per siaj flugiloj. Ŝi eksaltis... kaj tuj aŭdiĝis hurlo sur la montaro :

— Hu ! Hu !

Ŝi ekpensis pri la lupo ; la tutan tagon, la petolulino pensis pri li... Samtempe, trumpeto sonis tre malproksime en la valo Sinjoro Seguin faris lastan klopodon.

— Hu ! Hu ! respondis la lupo.

— Revenu, revenu ! invitis la trumpeto.

Blanquette preskaŭ emis reveni sed la memoro de la fosto, la ŝnuro, la heĝo de la tereno pensigis al ŝi, ke nun, ŝi ne plu povus toleri tian vivrimedon. Kaj ŝi preferis resti.

La trumpeto ne plu sonis.

La kaprino aŭdis malantaŭ si bruon de folioj. Ŝi rigardis kaj en la ombro, vidis du nelongajn orelojn, tute rektajn kaj du brilantajn okulojn. Estis la lupo !

Dikega, senmova, sidanta sur sia postaĵo, tie li estis rigardanta la etan kaprinon blankan kaj jam antaŭe sin frandadis. Ĉar li estis certa ŝin manĝi, li ne rapidis, sed kiam ŝi rigardis dorsen, li ridaĉis malbonintence.

— Ha ! Ha ! jen la eta kaprino de Sinjoro Seguin, kaj li promenigis sian dikan langon ruĝan sur siaj tindrokoloraj lipoj.

Blanquette sentis sin senespere perdita. Iam memorante pri la historio de la maljuna Renalda, kiu luktis la tutan nokton antaŭ ol esti manĝata matene, ŝi pensis, ke estus preferinde ke la lupo manĝu ŝin tuj ; sed ŝanĝinte sian decidon, ŝi prenis defendan sintenon, kun malalta kapo kornoj antaŭe, kiel decas ĉe brava kaprino de Sinjoro Seguin... Neniun esperon mortigi la lupon — kaprinoj ne mortigas lupojn — sed nur por scii ĉu ŝi rezistos tiel longe kiel la Renalda.

Tiam la monstro alpaŝis kaj la etaj kornoj ekagis.

Ha ! brava kaprineto, kiel kuraĝe ŝi luktis ! Pli ol dek fojoj, mi ne mensogas, Gringorio, ŝi devigis la lupon retropaŝi por refari sian spiradon. Dum tiuj unuminutaj haltoj, la frandemulino haste enbuŝigis plian herberon ; poste, ŝi revenis al la batalo kun plena buŝo... Tio daŭris la tutan nokton. De temp' al tempo, la kaprino de Sinjoro Seguin rigardis la stelojn danci en la sennuba ĉielo kaj ŝi pensis :

— Ho ! Nur ke mi eltenu ĝismatene !

Sinsekve, la steloj malaperis. Blanquette duobligis siajn kornofrapojn kaj la lupo siajn mordovundojn. Pala lumeto montriĝis ĉe l'horizonto... La voĉo de raŭka koko aŭdigis sin en farmo.

— Fine ! pensis la kompatinda besteto, kiu esperis nur la taglumon por morti ; ŝi sterniĝis surtere en sia bela felo blanka, makulita de sango.

Tiam, la lupo saltis sur la kaprineton kaj ŝin formanĝis.

tradukis A. RIBOT.

SEMINARIO PRI REKTMETODA INSTRUADO DE ESPERANTO

de lundo 17/8 ĝis inkluzive de sabato 22/8

Celo de la seminario. — Enkonduki kursgvidontojn en la arto gvidi Esperanto-kursojn, kiujn karakterizas amuzo, ĝuo kaj sukceso, same por la instruanto kiel por la lernantoj.

Programo de la seminario. — Dum la unua tago okazos prezento de, kaj diskuto pri, la aparta apliko de rektmetoda lingvo-instruado en la Baza Kurso de Esperanto far Audrey C.E. Childs-Mee. Sekvos prezento de la kursmaterialo kun aparta atento al la metodo prepari sin por instrui per ĝi.
Dum kvar tagoj la materialo estos detale studata kaj aktive uzata, flanke de la seminariantoj. Antaŭ la fino de la seminario, ĉiu kandidato por atesto preparos kaj prezentos provlecionon.

Praktikaj detaloj. — La seminario estos malfermita al tiuj, kiuj celas gvidi rektmetodajn kursojn en Esperanto, ĉu profesie, ĉu ne profesie, kaj kiuj altgrade kompetentas en la lingvo.


Ĉiu seminarianto bezonas propran ekzempleron de la kurskompleto, aĉetebla, je enskribiĝo komence de la seminario. La seminario daŭros proksimume tridek horojn, po kvin horoj tage en la kadro de la Tria Periodo de la kulturaj aranĝoj de Grezijono.

Frua sinanonco estas rekomendita.

Kultura Esperanto-Domo, Gresillon
49150 Baugé - Francio

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo
Vort-enigmo



La kaŝita frazo estis : Esperanto servas jam naŭdek jarojn.

HISTORIETOJ

Diskreteco

La junulo delogis al peka amrilato la edziniĝintan virinon.

— Mi aŭskultus vin — diris la virino —, sed mi timas, ke vi rakontos tion.

— Mi ĵuras, ke mi silentos — diris la junulo kaj li vere silentis.

La virino iĝis pli kaj pli maltrankvila.

— Mi mortos — plore ŝi diris foje —, se mi ne povos rakonti al iu pri nia amrilato. Sed mi volus rakonti al tiu, je kiu mi povas fidi, kiu konservas la sekreton, kiu ne disklaĉas ĝin.

— Jen ideo ! — ekvoĉis la saĝa junulo. — Rakontu al via edzo. Li tutcerte ne distrumpetos ĝin.

La malĝoja vidvino

La belega vidvino hejmenvenis de la entombigo de sia edzo.

Ĉiu aprecis la aflikton de la vidvino, la parencoj, la amikoj kaj amikinoj lasis ŝin sola, ke ŝi laŭplace translasu sin al la doloro. Nur unusola viro restis kun ŝi, junulo, kiu estis jam delonge enamiĝinta al ŝi. Nun, kiam ili restis solaj, li pentris per ardantaj vortoj siajn sentojn.

— Estu mia edzino ! — li diris kortuŝite.

— Ho vi malfeliĉulo — vortatakis lin la vidvino —, kaj vi diras tion nur nun !

— Kiam mi devus esti dirinta ?

— Antaŭ la entombigo ! Vi povus esti indulginta min, ke mi verŝu tiom da superfluaj larmoj !

La bona filo

Riĉa, sed iome pliaĝa viro subite mortis kaj tio ĵetis la junan edzinon en eternan funebron.

Kvar monatojn post la morto de la edzo, la nekonsolebla vidvino donis vivon al negrido.

— La infano estas iome nigra — diris la amikinoj de la edzino.

— Kompreneble — ĝemspiris la juna patrino kortuŝite —, la kompatinda etulĉjo funebras sian patron.

Jenö Heltai
Tradukis el hungara
Istvân Nagy

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

DE post substantiva radiko montras :

RIM : oni atentu

— radika substantivo (pano, homo)

— elverba substantivo (mortigo, preparo)

1

La posedanton

— la libro **de Petro**, li estas la fiero **de de sia patro.**

2

La posedatan econ : ĉevalo de blanka koloro (blank-kolora ĉevalo) homo de bela staturo (belstatura homo).

3

La rilaton inter du substantivoj (kiam la dua estas la mezuro de la unua) sumo de mil frankoj ; aĝo de ok dek jaroj.

4

La apartaĵon de aĵo :
prenu duonon de la kuko.

5

La aganton de la ago (ĉe elverba substantivo) la amo de la gepatroj ; la ŝuldo de nia kliento.

6

La objekton de la ago (ĉe elverba substantivo) mortigo de homo (mortigi homon) preparo de festo.

RIM : Uzo de FARE DE por eviti konfuzon inter **aganto** (5) kaj **objekto** (6) nutrado de la infanoj (nutri infanojn) fare de la patrino (la patrino nutras).

Simplan dependecon : prezo de pano ; utileco de esperanto.

NI RIMARKU

Bone estas uzi, anstataŭ **DE** pli taŭgan prepozicion :


kongreso **en** Lucerno ; fruktoj **el** la ĝardeno ; rigardo **super** la libroj ; pruvoj **pri** lia kuraĝo ; preparoj **por** la festo ; ridi **pro** lia naiveco.

Mirindeco de la Meĥanismo :



Trakti informojn per komputero estas infanludo. Vidu : sumo de 2 720 431 litroj. Jen kio ni entute verŝis kaj verŝos sur tiun pavimon ĝis nia pensio.

Celebro de la Patrina Festo :



Jes, Paĉjo, Panjo preparis tre bonan manĝon. Nun, dum paĉjo faras sian sieston, ni serĉu en la televida programo, la specialan elsendon por la Festo de la Patrinoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KAS SEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brŭcke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - 5 (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (8000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (22 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (12 us. dol.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSO VIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj lan doj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1981, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

En ce début de printemps, au chant des oiseaux se mêle le bruit désolant de la tronçonneuse : les travaux nécessaires de nettoyage du bois se poursuivent. Sous la scie des bûcherons, le parc revient, trente ans en arrière, à l'époque de la jeunesse de la Maison. Nous pourrions nous en réjouir si cette jeunesse n'avait pas été difficile si une partie du bois n'était pas, comme alors, quelque peu désertique. En compensation, dans les prés bas, entre l'étang et la route, nous avons fait planter près de deux cents peupliers, et nous espérons commercer à repeupler le bois dès cet automne. Restons sur cette note optimiste car c'est pour les futures générations d'espérantistes que nous travaillons ainsi.

Des « échantillons de la génération montante » vont se réunir à la fin du mois de mars. Malheureusement, si le nombre de jeunes de moins de quinze ans sera à peu près le même que l'an dernier, une quarantaine, deux pays seulement seront représentés. Le découpage nouveau de l'année scolaire, l'étalement des vacances font que le temps de liberté des animateurs ne coïncide plus avec la plupart des vacances des écoliers étrangers. Ce stage sera certainement un succès une fois encore, mais aussi international. Espérons que l'intérêt pour le stage de pédagogie sera plus grand que l'an dernier.

Aussitôt après ce stage vont se retrouver au château une dizaine d'amis peintres et tapissiers amateurs. Un très gros travail les attend qui ne pourra peut-être pas être terminé à la fin de la semaine. Mais je suis sûr que le maximum sera fait et que l'espéranto aura sa place grâce à quelques éléments actifs.

Comment s'annonce l'été ? Bien. Plus tôt que d'habitude, nous avons dû refuser des demandes de séjours. Dès le début de mars, il n'y avait plus ni chambres particulières, ni chambres familiales disponibles. Quinze jours plus tard, la deuxième période ne peut plus accueillir de stagiaires qu'en chambres à plusieurs lits. Il va, cette année encore, y avoir quelques désillusions. La plupart des espérantistes étrangers qui nous écrivent pour la première fois nous disent que des amis qui sont venus à la Maison Culturelle ont parlé avec enthousiasme des activités et du cadre. Il était donc indispensable de conserver l'attrait de ce cadre et, pour ce faire, de rénover aussi l'extérieur du château.

P. BABIN.

INTER NI

Ĉe la komenco de tiu nova printempo aŭdiĝas, krom la feliĉiga kanto de la birdoj, la malagrabla bruo de la motorsegilo : la necesa purigado de la arbaro daŭras. Per la segilo de la laboristoj la parko iras malantaŭen al la epoko de la junaĝo de la Kultur-Domo, antaŭ tridek jaroj. Ni povus ĝoji pri tio se tiuj unuaj paŝoj ne estus estintaj malfacilaj, se parto de la arbaro ne estus nun, kiel antaŭ tridek jaroj iom senarba. Kompence la malaltaj herbejoj inter la lageto kaj la vojo al Le Lude estas nun priplantitaj je preskaŭ ducent poploj, kaj ni esperas « rearbigi » la arbaron venontaŭtune. Ni estu optimistaj ĉar ni laboras por la kreskanta generacio.

Anoj de tiu generacio tre baldaŭ renkontiĝos en Gresillon. Bedaŭrinde, kvankam la nombro da malpli ol 15-jaraj geknaboj estos la sama kiel lastan jaron, nur du landoj estos reprezentitaj, pro la nova sistemo de la ferioj en Francio. Tamen ni estas certaj, ke tiu printempa periodo estos sukcesa.

Tuj post tiu staĝo kuniĝos deko da gesamideanoj amatoraj farbistoj. Granda laboro atendas ilin. Ili certe faros sian eblon maksimuman eĉ se ili ne atingas la finan celon je la fino de la semajno.

Kaj kio pri la somera sezono ? Jam de la komenco de marto ĉiuj unupersonaj ĉambroj kaj familiaj ĉambroj estas rezervitaj por la unua periodo kaj ili baldaŭ estos ankaŭ por la dua. La aliĝoj por la tria periodo regule alvenas. Ĉiiare kiel la antaŭajn jarojn kelkaj malfruantoj ricevos seniluziiĝon.

LES CONFERENCES DE LA PREMIERE PERIODE D'ETE

Quelques autres titres :

— La littérature catalane du Moyen-Age (Jordi Carbonell).

— Histoire et paysages de Capri (Edgar Müller-Wendt).

d'autres titres vont suivre.

NOS JOIES

Ils se sont connus à Grésillon.

Ils se sont mariés le 18 avril.

Louis-Nicolas BABIN et Francizka WITTTERS

Tous nos vœux de bonheur aux nouveaux époux, et félicitations à M. et Mme Babin, les « responsables » de la rencontre !

LIBRO-SERVO

S-ro CIRET, « La Timeraie », Vieil-Baugé

49150 Baugé

C.C.P. : Maison Culturelle Espérantiste - Nantes 1485 39 P

Prix franco au-dessus de 80 francs

PRIX EN MARS 1981

SUITE DU CATALOGUE

Lingvo kaj movado :

ABC de Esperanto (Waringhien) franca lingvo	8,00
Aŭtografoj de LL Zamenhof	4,00
Aventuroj de pioniro (Privat)	22,00
Bulonjo 1905 (Ribot)	4,00
Le Docteur Esperanto (Ziokowska)	10,00
Elektitaj paroladoj (Lapenna) pri la movado kaj la lingvo	30,00
L'Esperanto (Janton)	20,00
L'Esperanto dans l'Enseignement (P. Denoel)	6,00
Esperanto (Bibliothèque de Travail)	8,00

Esperanto en Perspektivo - enciklopedia gvidlibro 190,00
Facetoj de esperanto (Auld) Eseoj pri poezia lingvaĵo 12,00
Falsaj amikoj en Esperanto (Bernard-Ribot) 3,50
Fundamento de Esperanto, gramatiko, ekzercaro, vocabulaire, broché 20,00
relié 28,00
Gvidlibro por supera ekzameno (Pechant) kompendio pri la movado kaj ties historio 35,00
Une humanité, une langue (S. Glodeau) 5,00
Lingvaj respondoj (pri leksikologiaj kaj gramatikaj demandoj) ..... broché 15,00
..... relié 18,00
Lingvistikaj Aspektoj de Esp. (J. Wells) 28,00
Lingvo kaj logiko (Goodheir) 5,00
Planlingvaj problemoj (Gilbert) kompara interlingvistiko 25,00
Pri lingvo kaj aliaj artoj (Auld) 15 eseoj 42,00
Pri la Internacia lingvo dum jarcentoj (Mag. Dratwer) 75,00
Une langue internationale (Rougetet) 5,00
Une approche de la langue internationale (U.F.E.) 5,00
Tu seras esperantiste. (Delaire) 6,00
Zamenhofa Esperanto (Simpozio pri ata-ita) 50,00

Romanoj, noveloj, rakontoj :

Amara pano (Darvas) 10,00
Anni kaj Montmarte (R. Schwartz) romano originala 22,00
Asteriks la Gaŭlo — amuza bildstria rakonto .. 25,00
Baza literatura krestomatio 30,00
Besto-farmo (La) (Orwell) fablo pri revolucio kaj ties sekvoj 15,00
Ĉiu-Ĉiun (Jung) memoraĵoj de la fondinto de Heroldo de Esp. 80,00
Ĉu li bremsis sufiĉe ? (Valano) originala krimromano 30,00
Ĉu vi kuiras ĉine ? (Valano) originala krimromano 30,00
Dekkinga fuĝas. (T. Adema) fantazia humura romano 20,00
Dia avarulo (La) (Dobraczynski) biografio de pastro Kolbe 25,00
Dro Dorner (Egerrup) originala romano pri arta gravedigo 30,00
Dona Barbara (R. Gallegos) latinamerika literaturo 40,00
Dorse kontraŭ la muro (P. Wybenga) dummilitaj spertoj 24,00
Dudek kvin jaroj — antologio de belartaj konkursoj 25,00
Ekzistencialistaj herooj (C. Llech-Walter — dulingva tezo) 10,00
El la vivo de Bervala sentaŭgulo (Beaucaire) « maldeceta epizodaro » 25,00
Eriko kaj vipuro — de infanoj por infanoj 8,00
Fabelo pri bela suneto — de infanoj por infanoj 10,00
Fianĉo de l'sorto (Rosbach) originala romano .. 40,00
Filoj de l'ŝtonkora homo — bildstria adaptaĵo de romano 18,00
Forkaptita (R. L. Stevenson) aventurromano 30,00
Foĉjo kaj Ozak de infanoj por infanoj 10,00
Fundamenta Krestomatio — por la seriozaj studantoj 50,00
Gaja leganto per Esperanto (Schwerin) 6,00
Granda Kaldrono (La) (J. Francis) originala romano 95,00
Gudrun (J. V. Jensen) amromano de Nobelpremiito 30,00
Ĝardeno de la urbestro (L. Gabrielli) aŭtobiografia novelaro 25,00
Islandaj pravoĉoj — traduko de tri rakontoj kaj unu poemo 25,00
Japana kvodlibeto — poemoj kaj prozoj kun japana etoso 18,00
Junaĝa verkaro (Privat) prozaĵoj, poemoj, teatraĵo 18,00
Kanako el kananam (K.G. Linton) instruriĉa originala rakonto 25,00
Kara dizblino (Boatman) misterromano 30,00
Karlo (Privat) — interesa infanliteraturaĵo 6,00
Kie boacoj vagadas (E. Salovaara, originala novelkolekto pri la vivo de la Laponoj) 15,00
Koko krias jam (F. Szilagyi) originalaj noveloj 35,00
Kredu min sinjorino. (C. Rossetti-aŭtobiografia romano) 20,00
Kruko kaj Baniko el Bervalo (Beaucaire) — maldeca anekdotaro 38,00
Kumeŭaŭa (T. Sekelj) aventuroj inter indianaj triboj en Brazilo 24,00
... kun siaspeca spico (Schwartz) antologio el humuraĵoj 30,00
Leo Tolstoj (Lebrun) — verkita de la persona sekretario 85,00
Marta (E. Orzesko) — unu el la famaj tradukoj de Zamenhof 22,00
Metropoliteno (V. Varankin) unu el la ĉefverkoj 55,00
Mi amis junulinon (Trobisch) 20,00
Mi estas Pelé — aŭtobiografio de la « futbalreĝo de Brazilo » 30,00
M. Tot aĉetas mil okulojn. (J. Forge) detektivromano 35,00
Naskiĝo de Esperanto-Domo historio de la Esperanto-Domo Gresillon 5,00
Nekonata konato (Boatman) originala misterromano 20,00
Neologisme (Lorjak) originala verketo en sprita lingvaĵo 25,00
Ne plu ludo (Barthelmes) — originalaj noveloj 14,00
Noktoj (Sire) — alegoria bildstria rakonto 10,00
Normandaj Rakontoj (Maupassant) — majstra traduko 36,00
Nova butikisto de Nukugaia (B. Potts) amuzaj noveloj 35,00
Nuda inter lupoj (Apitz) — el la koncentrejo Buchenwald 30,00
Okupacio (E. Krusten) la germana okupacio en Estonio 6,00
Perdita honoro de iu K. Blum (La) (H. BOLL) protesromano pri sensacia ĵurnalismo 35,00
Perdita vizaĝo (La) (J. Nesvabda) sciencfikciaj rakontoj 10,00
Petro Schlemil (Chamisso) la viro kiu forvendis sian ombron 6,00
Raymond Schwartz (R. Bernard) 12,00
Saltego trans jarmiloj (J. Forge) humura romano 25,00
Satiroj (F. V. Dorno) humura novelaro 30,00
Servokapabla (G. Eekhoud) belgaj rakontoj 5,00
Sunkrono (La) (M. Koenen) 10,00
Tartarin de Taraskono (Daudet) fantazia satiro 20,00
Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz) geknaboj en Norda Afriko 52,00
Trans la fabeloceano (Szilagyi) por infanoj kaj plenaĝuloj 25,00
Trogroŝa romano (B. Brecht) socikritika romano 50,00
Tri verkoj de Volter (trad. Lanti) 35,00
Vage tra la dimensioj (K. Gaku) originalaj sciencfikciaj rakontoj 25,00
Venis viro (T. Nelsen) krimromaneto 18,00
Vivo kaj opinioj de mastro M'Saud (Ribillard) la filozofia kompreno de la vivo laŭ vidpunkto de azeno 25,00
Vojaĝo al Kazohinio (S. Szathmari) kvazaŭ nova Gulivermondo 35,00

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET

« La Timeraie »

VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 80 Fr.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

PAŜOJ AL PLENA POSEDO

(4e édition)

de **William AULD**